

KATOLIKA S[☆]ENTO

Periodico dell'Unione Esperantista Cattolica Italiana (UECI)

www.ueci.it

"Per la promozione della fratellanza e della comprensione tra i vari popoli di diverse lingue" (Paolo VI)

Periodico bimestrale - Reg. trib. di Vercelli 22.12.1997 n. 306 -
Sped. in abb.post. art. 2 comma 20/c L662/96 - filiale di Vercelli -
Direttore resp.: Mons. Gianni Ambrosio - Dir. e amm.: Vercelli, via Benadir, 62
Stampato da Centro Grafico Pirola-Lissone (MB)

Anno 99 - n.3 /2020
Luglio/agosto/settembre

CENTJARA DATREVENO DE LA NASKIĜO DE SANKTA JOHANO PAŬLO la 2-a



Pola poŝtmarko

“Kaj hodiaŭ ni povas diri ĉi tie: antaŭ cent jaroj la Sinjoro vizitis sian popolon, sendis viron, preparis ilin por esti episkopo kaj gvidi la Eklezion”.

Papo Francisko en la centjariĝo de la naskiĝo de Sankta Johano Paŭlo la 2-a

“E oggi noi qui possiamo dire: cento anni fa il Signore ha visitato il suo popolo, ha inviato un uomo, lo ha preparato per fare il vescovo e guidare la Chiesa”.

Papa Francesco nel centenario della nascita di San Giovanni Paolo II



Edmund Wojtyła



*66-a kongreso de IKUE (Kalwaria Zebrzydowska, 13.-20.07.2013)
Centro Johano Paŭlo la 2-a en Krakovo*

La 18-an de Majo 1920 naskiĝis Papo Wojtyła, beatproklamita de Benedikto la 16-a en 2011 kaj poste sanktproklamita de Papo Francisko la 27-an de Aprilo 2014. Multaj estas la rekordoj en lia vivo: unua neitala Papo post pli ol 450 jaroj; unua pola Papo en la historio; tria plej longa papado en la historio (27 jaroj); pli ol cent paŝtistaj vojaĝoj ekster Italio (kaj preskaŭ 150 en Italio); 14 enciklikoj, 15 apostolaj instigoj, 11 apostolaj konstitucioj, 45 apostolaj leteroj kaj 3288 paroladoj dum la apostolaj vojaĝoj.

Pluraj estas ankaŭ la difinoj donitaj al Johano Paŭlo la 2-a: la Papo de la dialogo, la Papo de la familio, la Papo de la junuloj.

Por ni esperantistoj li montris, ankaŭ antaŭ la elekto al la papado, proksimecon al niaj idealoj kaj kuraĝigon.

Dum lia papado la esperantista katolika movado travivis multajn gravajn momentojn de sia historio: la agnosko de IKUE kiel asocio laŭ papa juro, la aprobo de la Meslibro kaj de la Legafaro, la enkonduko de Esperanto inter la lingvojn uzatajn por la bondeziroj Kristnaskaj kaj Paskaj en placo Sankta Petro.

Il 18 maggio del 1920 nasceva Papa Wojtyła, beatificato da Benedetto XVI nel 2011 e poi canonizzato da Papa Francesco il 27 aprile del 2014. Molti sono i suoi primati: primo Papa non italiano dopo più di 450 anni; primo Papa polacco della storia; terzo pontificato più lungo della storia (27 anni); più di cento viaggi pastorali all'estero (e quasi 150 in Italia); 14 encicliche, 15 esortazioni apostoliche, 11 costituzioni apostoliche, 45 lettere apostoliche e 3.288 discorsi nel corso di viaggi apostolici.

Tanti sono anche gli appellativi che sono stati dati a Giovanni Paolo II: Papa del dialogo, Papa della famiglia, Papa dei giovani.

Per noi esperantisti egli dimostrò, anche prima dell'elezione al soglio pontificio, vicinanza ai nostri ideali e incoraggiamento.

Durante il suo papato il movimento esperantista cattolico visse molti momenti importanti della sua storia: il riconoscimento dell'IKUE come associazione di diritto pontificio, l'approvazione del Messale e del Lezionario, l'introduzione dell'esperanto tra le lingue usate per gli auguri di Natale e Pasqua in piazza San Pietro.

En tiu ĉi malfacila periodo, tamen, ni volas rememori lian homan suferadon per la vortoj kiujn Papo Francisko skribis en la antaŭparolo de la libro **“Sankta Johano Paŭlo la 2-a: 100 jaroj. Vortoj kaj bildoj”**(LEV):

“...Tio, kion ni kelkfoje riskas forgesi, kaj pri kio mi ŝatus atentigi la legantojn, estas kiom multe tiu ĉi Papo suferis dum sia vivo.

Liaj personaj suferoj ligiĝis al tiuj de lia popolo kaj de lia nacio, Pollando.

Frutempe orfo je patrino, li travivis la dramon de la morto, unue, de la tre amata frato kaj, poste, de la patro.

Kiam li aliĝis al la kaŝa Seminario de Krakovo li jam estis perdinta ĉiujn siajn plej karajn parencojn... Sankta Johano Paŭlo la 2-a suferis kiel Papo, spertis la teruran atencon de la jaro 1981, oferis sian vivon, verŝis sian sangon por la Eklezio, kaj atestis al ni, ke ankaŭ dum la malfacila elprovo de la malsano, ĉiutage kundivida kun la Dio iĝinta Homo kaj krucumita por nia savo, oni povas resti ĝojaj, oni povas resti sia mem...”.

Precipe la doloro pro la morto de lia frato Edmund kunigas lin al ĉiuj, kiuj perdis karulon pro tiu ĉi pandemio.

Edmund naskiĝis la 28-an de Aŭgusto 1906 kaj finis siajn studojn pri medicino pridiskutante sian magistran tezon la 29-an de Marto de 1930: en tiu evento partoprenis ankaŭ lia patro kaj la pli malgranda frato Karol, kiu tiam estis nur dekjara. La juna doktoro Wojtyła komencis labori en pediatria malsanulejo de Krakovo kaj poste en la hospitalo de Bielsko.

En aŭtuno 1932 doktoro Wojtyła iĝis estro de la fako pri infektaj malsanoj.

Iom poste, knabino kun skarlatino estis enhospitaligita.

Neniu kuracisto volis kuraci la pacientinon.

La kuracistoj timis la riskon esti kontagiataj de tiu malsano, por kiu tiutempe ne ekzistis kuracado, ĉar ankoraŭ ne estis ekzistis la taŭgaj

In questo difficile periodo, però, vogliamo ricordare la sua sofferenza umana con le parole che Papa Francesco ha scritto nella prefazione al libro **“San Giovanni Paolo II: 100 anni". Parole e immagini”**(LEV):

“... Quello che a volte rischiamo di dimenticare, e che desidererei porre all’attenzione dei lettori, è quanto questo Papa abbia sofferto nella sua vita.

Le sue sofferenze personali si sono legate a quelle del suo popolo e della sua nazione, la Polonia. Precocemente orfano di madre, vive il dramma della morte dell’amatissimo fratello e poi del padre.

Quando entra nel Seminario clandestino di Cracovia ha perso tutti i suoi familiari più stretti. San Giovanni Paolo II ha sofferto da Papa, ha subito il terribile attentato del 1981, ha offerto la propria vita, ha versato il suo sangue per la Chiesa, e ci ha testimoniato che anche nella difficile prova della malattia, condivisa quotidianamente con il Dio fatto Uomo e crocefisso per la nostra salvezza, si può restare lieti, si può restare noi stessi”.

Soprattutto Il dolore per la morte del fratello Edmund lo accumuna a tutti quelli che hanno perso un proprio caro a causa di questa epidemia.

Edmund nacque il 28 agosto 1906 e finì gli studi di medicina discutendo la tesi del dottorato il 29 marzo 1930: a questo evento partecipò anche suo padre e il fratello minore Karol che aveva appena 10 anni.

Il giovane dott. Wojtyła cominciò a lavorare in un ospedale pediatrico a Cracovia e successivamente presso ospedale di Bielsko. Nell’autunno del 1932, il dott. Wojtyła divenne il capo del reparto di malattie infettive. Poco dopo, una ragazza con la scarlattina fu ricoverata nell’ospedale.

Nessun medico voleva prendersi cura della paziente. I dottori avevano paura di contrarre la malattia per la quale in quel momento non c’erano cure perché non c’erano

antibiotikoj. Nur Edmund flegis la knabinon. Bedaŭrinde li mem estis trafita de la malsano kaj mortis iom poste, la 4-an de Decembro 1932. Li estis 26 jaraĝa.

Johano Paŭlo la 2-a diris ĉi tiujn vortojn dum interparolo kun André Fossard: “La morto de mia patrino profunde enradikiĝis en mia memoro, kaj, eble eĉ pli multe, tiu de mia frato, pro la tragikaj cirkonstancoj laŭ kiuj ĝi okazis, kaj ĉar mi estis pli matura”.

Ĵurnalisto Giampaolo Mattei en “L’Osservatore Romano” malkaŝis, ke la 22-an de Majo 1995 en Pollando, antaŭ la memorŝtono, kiu rememorigas la heroecan konduton de lia frato Edmund, la Papo abunde ploris, kortuŝita.

“Li estis lerta kuracisto kaj havis humursenton” diris la Papo inter la singultoj.

La du fratoj, malgraŭ la granda aĝdiferenco (12 jaroj), estis tre ligitaj inter si.

Kiam li estis infano, Edmund ĉiam zorgis pri sia frato. Johano Paŭlo la 2-a havis dum sia tuta vivo grandan admiron por la sanservaj laboristoj kaj ĉiam kuraĝigis ilin ĉie ajn, kien li iris.

(Esperantigis F.Fagnani)

ancora gli antibiotici adatti. Solo Edmund si prese cura della ragazza. Purtroppo contrasse la malattia lui stesso e poco dopo morì il 4 dicembre 1932. Aveva 26 anni.

Giovanni Paolo II disse queste parole nella conversazione con André Frossard: “La morte di mia madre mi si è profondamente incisa nella memoria, e forse più ancora quella di mio fratello, a causa delle circostanze drammatiche in cui avvenne, e perché io ero più maturo”.

Il giornalista Giampaolo Mattei sull’Osservatore Romano rivelò che il 22 maggio 1995 in Polonia, davanti alla lapide che ricorda la testimonianza eroica di suo fratello Edmund, il Papa pianse a dirotto, commosso.

“Era un bravo medico e aveva un senso di humor mio fratello” disse il Papa fra i singhiozzi.

I due fratelli, nonostante la grande differenza di età (12 anni), erano molto affiatati. Da bambino, Edmund si prendeva sempre cura di suo fratello. Giovanni Paolo II ha mantenuto per tutta la vita una grande ammirazione nei confronti degli operatori sanitari e li ha sempre incoraggiati ovunque andasse.

(T.F)

NI FUNEBRAS KAJ KONDOLENCAS

Nia membrino Lucia Zaniol, edzino de nia eksa prezidanto Serio Boschin, forpasis la 29-an de Julio en Treviso.

Dum la lastaj jaroj de sia vivo ŝi devis elteni longan malsanon, sed ŝi havis la komforton esti prizorgata de sia familio, precipe de sia edzo.

Ni dankas ŝin ĉar ŝi ĉiam subtenis sian edzon dum lia sindevigo en UECl.



Il giorno 29 luglio è morta a Treviso la nostra associata Lucia Zaniol, moglie del nostro ex presidente Serio Boschin.

Negli ultimi anni della sua vita ha dovuto sopportare una lunga malattia, ma ha avuto il conforto di essere assistita dalla famiglia, in particolar modo dal marito.

A lei il nostro ringraziamento per aver sempre sostenuto il marito nel suo impegno nell’UECI.

Kredo kaj societo

Vivi la pardonon

La pardonon estas eta "pilgrimado de la koro". Ĝi bezonas tempon, paciencon kun si mem, insiston en siaj decidoj ĝis la fino. Soifo pri venĝo povas doni kontentigon momentan, sed poste ĝi kondukas en la tenebron, kie ĝi hejmas.

(2a parto)

La ofendo kaŭzas senton de humiliĝo kaj honto en la ricevanto.

Estas grave ne fuĝi el tiu ĉi sufero kaj el ni mem, sed ĝin akcepti, ĉirkaŭlimigi kaj integri ĝin.

Se oni ne faras ĉi tiun laboron de rekono kaj akcepto de la sento pri humiliĝo kaj honto travivita en la sperto esti ofenditaj, oni riskas fali en psikologiajn kaptilojn, kiu maskas la veron.



*Il Cristo con la mano tesa a Furelos
Kristo kun etendita mano en Furelos*

En tiu ĉi vojo de kono de si mem estas grave, ke estu iu, kiu nin helpu.

Sin malfermi al persono, kiu igas, ke ni ree travivu pli trankvile la eventon, kiu nin vundis.

Agnoski sian koleron, la furiozon, kiun ni nutras interne, kaŭzitan de la evento, kiu nin vundis. Necesas esti vera kun si mem, male, oni transformas la pardonon en agon de hipokriteco. Unu el la pli komunaj efikoj en la sufokado de kolero estas transigi ĝin al la aliaj. Ne konsciinte pri sia propra kolero, oni ĝin atribuas al la aliaj kaj sekve oni sin sentas pli minacataj de ili.

Aŭ oni turnas ĉi tiun vagantan koleron, kaj ne agnoskitan kiel propran, kontraŭ sin mem,

Vivere il perdono

Il perdono è un piccolo "pellegrinaggio del cuore". Richiede tempo, pazienza con sé stessi, perseveranza nelle proprie decisioni fino alla fine. La sete di vendetta può dare una soddisfazione momentanea, ma poi porta nelle tenebre in cui essa dimora.

(2a parte)

L'offesa provoca un senso di umiliazione e di vergogna in chi la riceve.

È importante non fuggire da questa sofferenza e da noi stessi, ma accettarla, circoscriverla e integrarla.

Se non si fa questo lavoro di riconoscimento ed accettazione del senso di umiliazione e vergogna vissuto nell'esperienza dell'essere stati offesi, si rischia di cadere in trabocchetti psicologici che mascherano la verità.

In questo cammino di conoscenza di sé stessi è importante che ci sia qualcuno che ci aiuti. Aprirsi ad una persona che ci fa rivivere con più calma l'episodio che ci ha ferito.

Riconoscere la propria collera, la rabbia che nutriamo dentro, causata dall'episodio che ci ha ferito. Bisogna essere veri con sé stessi, altrimenti si trasforma il perdono in un atto di ipocrisia. Uno degli effetti più comuni del soffocare la collera è trasferirla sugli altri.

Non avendo preso coscienza della propria rabbia, la si attribuisce agli altri e di conseguenza ci si sente più minacciati da loro.

Oppure si rivolge questa collera vagante, e non riconosciuta come propria, contro sé stessi, allora ci si autoaccusa, ci si

tiam oni akuzas, punas sin mem, kun la risiko iĝi viktimoj de nerva deprimiĝo.

Kolero estas saniga instinkto al pluvivo fizika, psikologia kaj morala. Ĝia efiko noca aŭ pozitiva dependas de la uzo, kiun oni faras per ĝi. Se bone utiligata, ĝi utilas al la bona funkciado de la homaj rilatoj.

Kolero igas nin malkovri la valorojn, kiuj estas al ni plej karaj kaj kiujn kolero povas defendi. "Ne ekzistas emocioj negativaj aŭ fiaj en si mem.

La emocioj estas homaj energioj pozitivaj postulantaj esti rekonataj, regataj kaj utiligataj konscie por la bono nia kaj de la aliuloj" (J. Monbourquette).

Pardono adresata al la aliaj devas tutunue pasi tra la pardono, kiun oni donas al si mem, aliokaze ĉiuj streĉoj farotaj por pardonon la alian estos vanigitaj de la malamo, kiun oni havas al si mem.

La ofendo ricevita frakasos vian internan harmonion, elmovante en vi antagonismajn fortojn. Nur la humila pardono, kiun vi donos al vi sukcesos starigi en vi la pacon kaj vin helpas malfermi vin al la eblecoj pardonon la aliulon. Ekzistas pluraj fontoj de malamikeco kontraŭ sin mem. Unua fonto venas de la aspiro al feliĉo kaj perfekteco absoluta.

Iom post iom oni devas lerni akcepti siajn limojn kaj toleri la kulposenton ĉar oni ne estas perfekta. Jen tiu estas la vera humileco, kiu nin helpas akiri ĝustan dimension pri ni mem kaj ebligas al ni nin pardonon pro la fakto ke ni estas limigitaj kaj erarpovaj kaj pro la fakto ke ni nin kredis, male, ĉiopovaj kaj perfektaj laŭ ĉiuj aspektoj.

Alia fonto ebla de la kulposento kaj de la misfarto kiun oni povas sperti rilate al si mem elvenas el nia "ombro", t. e. el ĉiuj aspektoj de nia personeco taksataj neakcepteblaj kaj tial rifuzataj kaj subpremataj ene de ni, kiel, ekzemple, la agresemo.

Carl G. Jung, la konata svisa psikiatro, subtenas, ke neŭrozo naskiĝas el manko de akcepto kaj estimo pri si mem. Li skibas:

autopunisce, rischiando di diventare vittime di una depressione nervosa.

La collera è un istinto salutare di sopravvivenza fisica, psicologica e morale. Il suo effetto malefico o benefico dipende dall'uso che se ne fa. Se ben utilizzata serve al buon funzionamento dei rapporti umani.

La collera ci fa scoprire i valori che ci stanno più a cuore e che la collera può difendere. «Non esistono emozioni negative o spregevoli in sé stesse.

Le emozioni sono energie umane positive che richiedono di essere riconosciute, dominate e utilizzate consapevolmente per il bene nostro e degli altri" (J. Monbourquette).

Il perdono rivolto agli altri dovrà innanzitutto passare attraverso il perdono che si concede a sé stessi, altrimenti tutti gli sforzi che si faranno per perdonare l'altro saranno neutralizzati dall'odio che si porta a sé stessi.

L'offesa ricevuta farà a pezzi la tua armonia interiore, scatenando in te forze antagoniste. Soltanto l'umile perdono che ti accorderai riuscirà a stabilire in te la pace e ti aiuterà ad aprirti alle possibilità di perdonare l'altro.

Ci sono varie fonti di ostilità verso sé stessi. Una prima fonte deriva dalla ricerca di una felicità ed una perfezione assolute.

A poco a poco si deve imparare ad accettare i propri limiti e a tollerare il senso di colpa per non essere perfetti. Questa è la vera umiltà, la quale ci aiuta ad acquisire una giusta dimensione di noi stessi e ci consente di perdonarci per il fatto di essere limitati e fallibili e per esserci creduti, al contrario, onnipotenti e perfetti sotto tutti gli aspetti.

Un'altra fonte possibile del senso di colpa e del malessere che si può avvertire nei confronti di sé stessi emana dalla nostra "ombra" cioè da tutti quegli aspetti della nostra personalità ritenuti inaccettabili e perciò rifiutati e repressi dentro di noi, come per es. l'aggressività.

Carl G. Jung, il noto psichiatra svizzero, sostiene che la nevrosi nasca dalla mancanza di accettazione e di stima di sé. Egli scrive:

“Neŭrozo estas militstato kun si mem”.
Ni ĉiuj bezonas pardonon multajn aferojn al ni mem.

“Se iu estas kruela al si mem, kiel li povas su-
pozi, ke li estas kompatema al la aliuloj?”.

Kompreni la aliulon ne signifas lin ekskuzi aŭ senkulpigi, sed lin rigardi per rigardo pli klara por kapti iujn dimensiojn de lia personeco kaj la kaŭzojn de la gesto, kiu nin vundis.

Ĉio ĉi igos la pardonon pli facila ĉar, trovinte iujn kialojn de la agresa sinteno de tiu, kiu nin ofendis, tio ne plu alprenos por niaj okuloj la konturojn de gesto blinda kaj senkaŭza.

Oni diras, ke Dio pardonas ĉion ĉar li komprenas ĉion. Pli bona kompreno de la antaŭaj faktoj familiaj, sociaj kaj kulturaj de iu persono helpas nin ĝin pardonon.

Sin senti objekto de pardonon estas sperto eksterordinara, tuŝas nian eston en ĝia profundo. Ĝi donas la senton esti rekonataj kaj estimataj pro tio kio oni estas en la pleja profundo de si mem. Ĝi kondukas al la sensaco, ke ni sentas nin amataj en maniero senkondiĉa, malgraŭ niaj difektoj, niaj malsukcesoj kaj niaj malobeoj. Lasi sin esti amata kaj pardonata de Dio ŝajnas do la fonto kaj la elŝpruco de la amo al si mem kiu igas ebla la pardonon al tiu kiu nin ofendis.

“Mizerikordo ne estas devo. Ĝi descendas de la ĉielo kiel la refreŝigo de la pluvo sur la tero. Ĝi estas duobla beno: ĝi benas tiun kiu ĝin donas kaj tiun kiu ĝin ricevas”(W. Shakespeare). Estos la sperto de la patro, kiu, kortuŝite, kuras renkonte al ni, sin ĵetas al nia kolo kaj nin kisas (vd. Luko, 15, 20), kiu nin plenigos el tiu amo, kiun ni donacos niavice pardonante la aliulojn. Necesas esperi, ke, se ni longe Lin frekventas, Dio fine influos iomete ankaŭ sur nin.

Esperantigis Carlo Minnaja

«La nevrosi è uno stato di guerra con sé stessi». Tutti abbiamo bisogno di perdonare molte cose a noi stessi.

«Se qualcuno è crudele verso sé stesso, come può aspettarsi di aver compassione per gli altri?».

Capire l'altro non significa scusarlo o disculparlo, ma guardarlo con uno sguardo più lucido per afferrare alcune dimensioni della sua persona e i motivi del gesto che ci ha ferito. Tutto questo renderà il perdono più facile in quanto, avendo trovato dei “perché” al comportamento aggressivo di chi ci ha offeso, esso non assumerà più ai nostri occhi i contorni di un gesto cieco e gratuito.

Si dice che Dio perdoni tutto perché capisce tutto. Una migliore comprensione dei precedenti familiari, sociali e culturali di una persona ci aiuterà a perdonarla.

Sentirsi oggetto di perdono è un'esperienza straordinaria, tocca il nostro essere nella sua profondità. Procura la sensazione di essere riconosciuti e stimati per quel che si è nel più profondo di sé stessi. Porta a sentirsi amati in modo incondizionato, nonostante i propri difetti, i propri insuccessi e le proprie trasgressioni. Lasciarsi amare e perdonare da Dio appare dunque la fonte e la sorgente dell'amore verso sé stessi che rende possibile il perdono nei confronti di chi ci ha offeso.

«La misericordia non è un obbligo. Scende dal cielo come il refrigerio della pioggia sulla terra. È una doppia benedizione: benedice chi la dà e chi la riceve» (W. Shakespeare). Sarà l'esperienza del padre che, commosso, ci corre incontro, si getta al nostro collo e ci bacia (cfr. Lc 15, 20) che ci riempirà di quell'amore che doneremo a nostra volta perdonando gli altri. Bisogna sperare, a forza di frequentarlo, che Dio finisca per influire un pochino su di noi.

Don Salvatore Rinaldi




Cari associati/e,

come tutti noi sappiamo presso l'abitazione di Gianni Conti era conservata la biblioteca intitolata al compianto Glauco Corrado che dedicò molto del suo tempo ad arricchirla. Migliaia erano i volumi e le riviste raccolte nel corso degli anni. In questi anni Gianni Conti ha chiesto ripetutamente di trovare una degna soluzione per tutti i libri temendo per loro una fine "dolorosa". Finalmente due importanti istituzioni hanno deciso di accogliere il nostro patrimonio librario. Ora i nostri libri sono conservati presso la Biblioteca statale di Cremona e la Biblioteca dell'Esperanto presso l'Archivio di Stato di Marina di Carrara.



Don Ferdinando Longoni



Mons. Lorenzo Longoni



Glauco Corrado

Ripercorriamo la storia di questa biblioteca. Don Ferdinando Longoni, che fu anche presidente dell'IKUE, fu l'ideatore della biblioteca e, alla sua morte, il fratello Mons. Lorenzo Longoni, canonico della Cattedrale, la trasferì presso l'Arcivescovado di Milano in Piazza del Duomo nella nuova sede del Centro Esperantista Cattolico Milanese. Verso la fine degli anni 90, Giancarlo Sartorio di Genova, che conservava molti libri provenienti da esperantisti liguri, decise di donare tutta la sua raccolta al KEC (Katolika Esperanto-Centro) di Milano. Quando il nuovo Arciprete del Duomo chiese all'associazione di lasciare liberi i locali, il tutto fu trasferito a casa di Gianni Conti a Cormano. Da questo momento in poi la biblioteca diventa di proprietà di UECl. Nei prossimi mesi aggiorneremo la pagina relativa alla biblioteca pubblicata sul sito dell'associazione in modo che non si perda la memoria di un'iniziativa a cui tanti soci hanno dedicato tempo ed energie.

Ringraziamo tutti coloro che si sono resi disponibili a trovare una degna collocazione ai nostri libri: la presidente della FEI Michela Lipari, la direttrice della biblioteca di Cremona Raffaella Barbierato e il professor Davide Astori. Una menzione speciale a Gianni che, in questo periodo così doloroso per lui, ha preparato e spedito centinaia di scatoloni.

Comitato Centrale

Nia eta Parnaso

Rubrica dedicata alla Poesia - Rubriko dediĉita al Poezio

VISIONE D'AUTUNNO

*Il bosco appare infuocato.
Tra il fogliame
di aceri cremisi
rugginosi cornioli
si accendono.
Sotto l'alta faggeta
danza leggera,
con il vento silente,
una pioggia continua
di foglie ingiallite.*

AŬTUNA VIZIO

*Brulanta la arbaro aspektas.
En la foliario
de karmezinaj aceroj,
rustokoloraj kornusoj
ekflamas.
Sub la alta fagarbaro,
malpeze dancas,
per silenta venteto,
ja senhalta pluvo
de flaviĝintaj folioj.*

Ugo Intini

(esperantigis Ugo Intini)



Ugo Intini naskiĝis en 1939 en Tripolo (Libio). Ekde jam kvardek jaroj li loĝas en Fraskato, ĉarma urbeto sude de Romo. Li estas magistro pri geologio. En Italio li estis instruisto pri naturaj sciencoj kaj matematiko; nun li estas pensiulo. Nuntempe, lia preferata okupo estas lerni Esperanton skribi, kaj klopodi esperantigi proprajn rakontojn kaj fabelojn.




Ugo Intini è nato nel 1939 a Tripoli, in Libia. Da quarant'anni vive a Frascato, ridente cittadina a sud di Roma. È laureato in geologia. In Italia è stato insegnante di scienze naturali e matematica; ora è in pensione. Attualmente la sua occupazione preferita è imparare l'esperanto, scrivere e cercare di tradurre le sue storie e favole in esperanto.

Li estas membro de Ueci kaj kasisto de la "Esperantista Tuskolana Grupo". Liaj libroj, "Hundoj kaj katoj" kaj "Scienco en eroj", estas eldonita de Eldonejo Eva.

È socio UECl ed è cassiere del Gruppo esperantista Tuscolano. I suoi libri, "Hundoj kaj katoj" kaj "Scienco en eroj", sono pubblicati dalla casa editrice Eva.

PAROLU AL MI EN VIA LINGVO

“O mia bela Madunina che te dominet Milan”



*11-an de Marto 2020: la ĉefepiskopo de Milano, Delpini, sur la teraso de la Katedralo por preĝi al “Madonnina”
11.03.2020: l’arcivescovo di Milano, Delpini, sul tetto del Duomo per pregare la Madonnina*

Mi iris al la terasoj kien ofte la turistoj iras ĉar de supre la urbo alprenas alian aspekton. De supre oni povas vidi la kruciĝon de multaj epokoj, de modernaj turdomegoj kaj de antikvaj konstruaĵoj. Kaj oni pensas pri la historio de Milano kaj pri ĉio, kion ĉi tiu urbo travivis: la pesto, la milito, la gravaj ekonomiaj krizoj.

La “Madonnina” ĉiam restis tie, ĉe la supro de la plej alta turpinto, por protekti la urbon kaj ĝiajn loĝantojn. Mi pensis ke, samkiel oni superis tragikajn tempojn, situaciojn de grandega malfacilaĵoj, Ŝi helpos nin venki ankaŭ ĉi tiun periodon.

La bildo de ĉefepiskopo Delpini sur la terasoj de la katedralo, sola, sub la elstarantaj gotikaj pinakloj, kun paperfolio en la mano kaj la okuloj direktitaj al la “Madonnina” por preĝi por Milano kaj Italio plagitaj de la kronviruso, trakuris la mondon kaj ankaŭ impresis la Papon, kiu laŭdis lin per ĉi tiuj vortoj:

Sono andato sulle terrazze dove spesso si recano i turisti perché dall’alto la città assume un altro aspetto. Dall’alto si vedono incrociarsi tante epoche, grattacieli modernissimi ed edifici antichi. E viene da pensare alla storia di Milano e a tutto quello che questa città ha vissuto: la peste, la guerra, le gravi crisi economiche.

La Madonnina è sempre rimasta lì, in cima alla guglia più alta, a proteggere la città e i suoi abitanti. Ho pensato che come sono state attraversate epoche drammatiche, situazioni di difficoltà grandissima, Lei ci aiuterà a superare anche questo tempo”.

L’immagine dell’Arcivescovo Delpini sulle terrazze del Duomo solo, sovrastato dalle guglie gotiche, con un foglio di carta in mano e gli occhi puntati verso la “Madunina” per pregare per Milano e l’Italia piagate dal coronavirus, ha fatto il giro del mondo e ha colpito anche il Papa che l’ha elogiato con queste parole:

“La ĉefepiskopo estas proksima al sia popolo kaj ankaŭ proksima al Dio preĝante. La foto de la pasinta semajno venas al mia menso: li, sola, sur la tegmento de la katedralo preĝanta al la Madono”. Kaj, kiel ofte okazas en familiaj reunuiĝoj, Delpini sin adresas al la Patrino de Dio, parolante per la lingvo de la patroj kaj de la tero, la dialekto, kiu plej bone esprimas iujn sentojn kaj iujn animstatojn.

“Oh mia bela Madonina che te dominet Milan”(Mia Madoneto bela, vi imponas Milan’ de for): komenciĝas tiel la speciala preĝo de propeto al la “Madonnina” por la milananoj kaj la tuta ambrozia Diocezo. La frazo enkondukas ĉiun version de la preĝo kaj estas prunteprenita de “O mia bela Madonina”, kanto komponita de Giovanni D’Anzi en 1934.

La “Madonnina” estas la orumita statuo metita je la pinto de la Katedralo de Milano. Dumtempe ĉi-tiu kanto fariĝis la simbolo de la lombarda ĉefurbo.

La kredo estas transdonita per la dialekto

En la festo de la bapto de la Sinjoro, dum la bapto de iuj beboj en la Siksta kapelo Papo Francisko memorigas al la gepatroj, ke ilia unua tasko estas transdoni la kredon kaj li volis reliefigi la gravecon de la dialektoj kiel signoj de amo, koncernante la interrilaton gepatroj-gefiloj:

“La transdono de la kredo eblas nur per dialekto, la intima lingvo de la paroj. En la familia dialekto, en la dialekto de paĉjo kaj panjo, de avo kaj avino...”. Francisko dum elsendo de TV2000 “Ave Maria” asertis: “Mia denaska lingvo estas la piemonta dialekto. Kun mia avino mi havis specialan kunligon ĉar la geavoj loĝis 50 metrojn el nia domo.

Mi pasigis la tutan tagon kun ili kaj ni parolis nur dialekton. Mi povas diri, ke mia denaska lingvo estas la piemonta”.

(esperantigis N.Covelli)

“L’Arcivescovo è vicino al suo popolo e anche vicino a Dio nella preghiera. Mi viene in mente la fotografia della settimana scorsa, solo sul tetto del duomo pregando la Madonna”. E, come spesso accade nelle riunioni di famiglia, Delpini si rivolge alla Madre di Dio con la lingua dei padri e della terra, il dialetto, che esprime meglio alcuni sentimenti e alcuni stati d’animo.

“O mia bela Madunina che te dominet Milan”. Inizia così la preghiera speciale di intercessione alla Madonnina per i milanesi e tutta la Diocesi ambrosiana. La frase introduce ogni strofa della preghiera ed è presa in prestito da “O mia bela Madunina”, una canzone composta da Giovanni D’Anzi nel 1934.

La Madonnina è la statua d’oro posta in cima al Duomo di Milano.

Col tempo questa canzone è diventata il simbolo del capoluogo lombardo.

La fede si trasmette con il dialetto


Nella festa del Battesimo del Signore, durante il battesimo di alcuni neonati nella cappella Sistina Papa Francesco ricorda ai genitori che il loro primo compito è trasmettere la fede e ha voluto evidenziare l’importanza dei dialetti come segno d’amore, riferendosi al rapporto tra genitori e figli:

«La trasmissione della fede soltanto può farsi in dialetto, la lingua intima delle coppie. Nel dialetto della famiglia, nel dialetto di papà e mamma, di nonno e nonna...». Francesco in una trasmissione di TV 2000 “Ave Maria” ha affermato: «La mia lingua madre è il piemontese. Con mia nonna avevo un legame speciale perché i nonni abitavano a 50 metri dalla nostra casa.

Passavo tutta la giornata con loro e parlavano solo dialetto. Potrei dire che la mia lingua madre è il piemontese».

LA BELECO DE LA KREDO

Bildstrioj por la Kredo - I Fumetti nella Fede



La katolikoj estis la unuaj en Eŭropo, kiuj komprenis la kapablon de la bildstrio por la dissendado de ideoj kaj mesaĝoj. En Belgio, ekzemple, la uzado de la bildstrio estis aprokata de klerikoj por rekonkeri la gejunulojn al la kredo. Kardinalo Désiré Joseph Mercier (1851-1926) komisiis al pastro Norbert Wallez (1882-1952) la reorganizadon de la belga katolika presado, inkluzive de tiu por junuloj.

En la benediktana abatejo de Maredsous estis fondita lernejo por vidaj artoj kie forĝiĝis famaj artistoj kiel Joseph Gillain, nomata Jijé, kiu estis aŭtoro de la fama bildstrio "Don Bosco" antaŭ ne longe represita.

En Italio la revuoj "Il Giornalino" kaj "Vittorioso" estis la unuaj, kiuj publikigis en bildstrioj historiojn, sed multaj aliaj gazetoj gastigis en siaj paĝoj la plej grandajn italajn verkistojn kaj desegnistojn. El tio rezultis abunda produktaĵo de bibliaj kaj hagiografiaj bildstrioj.

I katolikoj estis la unuaj en Eŭropo, kiuj komprenis la potencialitaton de la bildstrio por la dissendado de ideoj kaj mesaĝoj. In Belgio, ad esem-pio, l'uso del fumetto fu promosso da ecclesiastici per riconquistare i giovani alla fede. Il cardinale Désiré-Joseph Mercier (1851-1926) incaricò don Norbert Wallez (1882-1952) di riorganizzare la stampa cattolica belga, compresa quella giovanile.

Nell'abbazia benedettina di Maredsous fu fondata una scuola di arti visive dove si formarono artisti famosi come Joseph Gillain, detto Jijé che fu l'autore del famoso fumetto «Don Bosco», recentemente ristampato.

In Italia "Il Giornalino" e il "Vittorioso" furono i primi a pubblicare storie a fumetti, ma molti altri periodici ospitarono nelle loro pagine i più grandi scrittori e disegnatori italiani. Ne derivò una copiosa produzione di fumetti biblici e agiografici.

Ankaŭ la vivo de Sankta Johano Paŭlo la 2-a estis rakontita per la bildstrioj ek de 1979. Dum lia longa papado multaj estis la publikaĵoj en ĉiuj lingvoj.

La biografio de la Papo per bildstrioj eldonita de "Il Giornalino" en kvar sinsekvaj partoj de decembre de 2000, estis poste bindita en volumon aprile de 2001. La 25-an de Julio 2001 la estraro de "Il Giornalino" estis akceptita, en nepublika aŭdienco, de Johano Paŭlo la 2-a, al kiu oni donis la volumon. "Kiam mi liveris al la Papo la bildstrian volumon – memoras la direktoro de 'Il Giornalino', pastro Antonio Tarzia – lia Sankteco, kortuŝita, karesis la paĝon en kiu estis la portreto de liaj gepatroj kaj ridetis observante la scenon en kiu li, infano, haltadis pilkon dum eta futbala matĉo". "Mi benas vian apostolan agadon ĉe la gejunuloj, ili estas la espero de la Eklezio".

(esperantigis N.Covelli)

Anche la vita di S. Giovanni Paolo II è stata raccontata con i fumetti fin dal 1979.

Durante il suo lungo pontificato molte furono le pubblicazioni in tutte le lingue.

La biografia del Papa a fumetti pubblicata da "Il Giornalino" in quattro puntate nel dicembre 2000 fu poi rilegata in volume nell'aprile 2001. Il 25 luglio 2001 la direzione "Il Giornalino" fu ricevuta in udienza privata da Giovanni Paolo II, al quale fu donato il volume. "Quando consegnai al Papa il libro a fumetti - ricorda il direttore de 'Il Giornalino' don Antonio Tarzia - Sua Santità accarezzò commosso la pagina in cui erano ritratti i suoi genitori e sorrise osservando la scena in cui lui, bambino, parava un tiro durante una partitella di calcio". "Benedico il vostro apostolato coi giovani, sono la speranza della Chiesa".



NI GRATULAS KAJ BONDEZIRAS



La 23-an de Julio naskiĝis Maria Festa, filino de nia kunlaborantino Chiara Franchitti kaj de Modestino Festa.

Ni prunteprenas la vortojn, kiujn Papo Francisko skribis: "Hodiaŭ mi volus danki ankaŭ la junajn patrinojn, kiuj alfrontas kompreneblajn timojn.

Kaj dankon ankaŭ al tiuj, kiuj subtenas ilin kun amo, kompetenteco.



Il 23 luglio è nata Maria Festa, figlia della nostra collaboratrice Chiara Franchitti e di Modestino Festa.

Prendiamo in prestito le parole che Papa Francesco ha scritto:

"Oggi vorrei dire grazie anche alle giovani mamme che affrontano le comprensibili paure. E grazie anche a chi le sostiene con affetto, con competenza.

La infanoj naskitaj en ĉi tiu tempo estas signo de granda espero".

I bambini che nascono in questo tempo sono un segno di grande speranza".

SCIIGOJ EL ESPERANTA MONDO

La pandemio de Covid-19 devigis nin ĉiujn draste ŝanĝi niajn vivkutimojn. Restante ene de niaj domoj, ni aprecis la plurajn iniciatojn interretajn kaj la helpon donitan de ili.

La katolika mondo montris fortan ĉeeston. Ĉiuj homilioj de la Papo estis publikigitaj en la vatikana retejo, la paroĥoj publikigis per interreto la sanktajn mesojn kaj komentojn pri la evangelio, kelkaj eldonejoj disponigis plurajn diĝitajn librojn senpage. Ĉi tio pliriĉigis nian tempon.

Ankaŭ la esperantista mondo montris viglecon kaj kreivecon.

Ni esprimas nian dankemon al ĉiuj niaj geamikoj, kiuj igis eble "ne interrompi la fadeon".

La pandemia da Covid-19 ha costretto tutti noi a cambiare drasticamente le nostre abitudini di vita. Rimanendo confinati all'interno dei nostri appartamenti, abbiamo apprezzato le tante iniziative digitali e i benefici offerti da esse.

Il mondo cattolico ha dimostrato una forte presenza. Tutte le omelie del Papa sono state pubblicate sul sito del Vaticano, le parrocchie hanno messo in rete riprese delle S. Messe e commenti al Vangelo, alcune case editrici hanno reso disponibili libri digitali gratuitamente. Tutto ciò ha arricchito il nostro tempo. Anche il mondo esperantista ha dimostrato vitalità e creatività.

Esprimiamo la nostra riconoscenza a tutti i nostri amici che ci hanno permesso di "non interrompere il filo".



*Geedzj Foà
Beppe Pranzo
Bruno Mercandalli*

*Gianni Conti
Francesco Fagnani*

Skribas nia vicprezidanto Francesco Fagnani, kiu kunordigas la konversacian grupon, kiu renkontiĝas en Milano:

"La kronviruso neeviteble haltigis la sidejajn aktivaĵojn de la Milana Esperanto-Klubo, sed la kutima ĉiusemajna konversacio en Esperanto, kiun dum longa tempo prizorgis Johano Daminelli, regule plidaŭras.

Ci scrive il nostro vicepresidente Francesco Fagnani che coordina il gruppo di conversazione che si riunisce Milano:

"Il coronavirus ha inevitabilmente fermato le attività in sede del Circolo Esperantista Milanese, ma la consueta conversazione settimanale in esperanto, di cui a lungo si è occupato Giovanni Daminelli, prosegue regolarmente. La



La konversacio okazas ĉiumerkrede de la 17a ĝis la 19a horo (uzante Skajpon) kun la partoprenon de deko da homoj, inter kiuj gastoj el Kanado, Anglujo, Germanio”.

conversazione si tiene ogni mercoledì dalle 17 alle 19 in videochiamata (tramite Skype) e vede la partecipazione di una decina di persone, tra cui ospiti dal Canada, dal Regno Unito, dalla Germania”.

Virtualaj tagoj de IKUE per

Giornate virtuali dell'IKUE tramite

zoom



La prezidantino de IKUE Marija Belošević organizis kunvenon titolita “Virtualaj tagoj de IKUE katolikaj esperantistoj”, kiu donis al la esperantistoj de la tuta mondo la eblecon preĝi kune kaj interŝanĝi opiniojn.

La kunvenoj okazis de la 14-a ĝis la 21-a de Aŭgusto 2020 (tagoj inter la datrevenoj de niaj du patronoj Sankta Maksimiliano Kolbe kaj Sankta Papo Pio la 10a).

Ĉiu renkontiĝo komenciĝis je la 16a horo kaj daŭris 4/5 horojn. La programo estis tiel aranĝita: meditado pri la taga Evangelio, komuna rozario, konferencoj, diskutoj pri la agado de IKUE, prezento de pasintaj kunvenoj, muzikaj lecionoj de Albrecht Kronenberger. La kunveno estis okazo ankaŭ por paroli pri niaj patronoj.

La dimanĉa programo, ekzemple, estis dediĉita al Sankta Johano Paŭlo la 2-a. La partoprenantoj povis dividi siajn proprajn atestojn. Ili estis retkunigitaj de multaj landoj: Kroatio, Italio, Aŭstrio, Francio, Pollando, Ĉeĥa Respubliko, Slovakio, Germanio ktp ktp.

La kunvenoj daŭros ĉiunmonate dum la tuta venonta jaro.

La presidente IKUE Marija Belošević ha organizzato un convegno settimanale intitolato “Virtualaj tagoj de IKUE katolikaj esperantistoj” che ha dato la possibilità agli esperantisti di tutto il mondo di pregare insieme e scambiare opinioni. Gli incontri si sono svolti dal 14 al 21 agosto 2020 (giorni compresi fra le ricorrenze dei nostri due patroni San Massimiliano Kolbe e San Papa Pio X).

Ogni incontro iniziava alle 16 e durava 4/5 ore. Il programma era così articolato: meditazione sul Vangelo del giorno, rosario comune, conferenze, discussioni sull'operato dell'IKUE, presentazione dei congressi scorsi, lezioni di musica tenute da Albrecht Kronenberger. Il convegno è stato un'occasione per parlare anche dei nostri patroni.

Il programma della domenica, per esempio, è stato dedicato a San Giovanni Paolo II. I partecipanti hanno potuto condividere le loro personali testimonianze. Essi erano collegati da tanti paesi: Croazia, Italia, Austria, Francia, Polonia, Repubblica ceca, Slovacchia, Germania ecc.ecc. Gli incontri proseguiranno ancora durante l'anno.

Bibliaj tagoj per WhatsApp



Stefan Lepping

Stefan Lepping ludis religiajn kantojn per piano. La luterana pastoro Wolfram Rohloff komentis kelkajn psalmojn.

Ankaŭ la Bibliaj tagoj en Worms, Germanujo, de la 25-a ĝis la 29-a de Marto 2020, estis nuligitaj. Ĉiutage la aliĝintoj ricevis videofilmetojn per WhatsApp.

Anche i Bibliaj tagoj a Worms, in Germania, dal 25 al 29 marzo 2020, sono stati cancellati. Ogni giorno gli iscritti ricevevano video tramite WhatsApp.



Wolfram Rohloff

Stefan Lepping ha suonato canzoni sacre al pianoforte. Il pastore luterano Wolfram Rohloff ha commentato alcuni salmi.



Vatikana Radio

Podcast

<https://www.radio-vatikana-esperanto.org/>

<https://www.vaticannews.va/eo/podcast/esperanto-programo.html>

Ankaŭ dum la periodo de kompleta kvaranteno de Italio kaŭzita de la pandemio, daŭris la esperantlingvaj elsendoj de Radio Vatikana. Ilia prizorganto, Carlo Sarandrea, realigis ilin hejme.

Anche nel periodo di isolamento nazionale dovuto alla pandemia sono proseguite le trasmissioni in esperanto di Radio Vaticana. Il loro curatore, Carlo Sarandrea, le ha realizzate da casa.

“Ni bezonas spiri la veron de bonaj rakontoj: rakontoj, kiuj konstruas, ne detruas; rakontoj, kiuj helpas trovi la radikojn kaj la forton por antaŭeniri kune”.

Papo Francisko, Mesaĝo por la Monda tago de la socikomunikiloj 2020

“Abbiamo bisogno di respirare la verità delle storie buone: storie che edificano, non che distruggano; storie che aiutino a ritrovare le radici e la forza per andare avanti insieme”.

Papa Francesco, Messaggio per la Giornata mondiale delle comunicazioni sociali 2020

COMITATO CENTRALE U.E.C.I.

Presidente: Tiziana **FOSSATI**, Via F. Filzi 30/A, 20035 Lissone (MB) - tel. 039.464942
e-mail: katolika.sento@ueci.it (la residenza del presidente è anche sede dell'associazione)

Vice presidente: Francesco **FAGNANI**, Via Bartolomeo Eustachi 47, 20129 Milano (MI)

Segret./Cassiere: fra Pierluigi **SVALDI**, Piazza San Francesco, 1 - 38057 Pergine Valsugana (TN) – tel. 0461.531109

Responsabile congressi: Giovanni **CONTI**, Via Fabio Filzi 51, 20032 Cormano (MI) - tel. 02.66301958

Consulente editoriale: Carlo **SARANDREA**, Via Santa Bernadette 6, 00167 Roma (RM)

Addetto alla logistica: Felice **SOROSINA**, Via Sarnico 17, 24060 Tavernola (BG) – tel. 3492191838

Consigliere: Norma **COVELLI CESCOTTI**, Via Enrico Fermi 29, 38100 Trento (TN) – tel. 0461.925210

Consigliere: Giovanni **GAZZOLA**: Via Cendrole, 32 - Spineda, 31039 Riese Pio X (TV)

Assistente Ecclesiastico: mons. Giovanni **BALCONI**, Piazza Duomo, 16, 20122 Milano (MI)

Nota bene: Tutte le comunicazioni alla redazione di Katolika Sento vanno spedite al presidente UECEI.